

Fragmento el la mesaĝo de Fabien van Mook, datita 2011-02-24:

40 Ladista foldo

Mi ne povas superrigardi la ladistan temon pro la manko de sperto kaj scio. Tamen mi nun provas studi la aferon per la tekstoj en la KF-j.

Se mi legas la difinojn de fleksi, faldi kaj foldo en PIV 2005, mi rimarkas precipe la diferencojn (eĉ kontraŭojn) inter la diversaj signifoj de la sama vorto, kaj la partajn kongruojn inter unu vorto kaj alia vorto. Pro tio vi kaj la kolego Pierre ambaŭ foje pravas dum vi indikas malsamajn vortojn. Tiam vi parolas ne kune, sed unu preter la alia. Mi pensas, ke vi ne tuj aludu iun aŭtoritaton. Pri la uzo de ĉiutagaj vortoj kiel fleksi kaj faldi oni ja facile povas malsame opini, ĉar la difinoj ne estas tute precizaj; kaj des pli malfacilas interkonsenti pri analogioj kaj metaforoj pro nacilingvaj kutimoj kaj propraj pensmanieroj.

faldi: ... pluroble fleksi ... ĝenerale ion ajn maldikan aŭ ion artikigitan ... foldo: 1 ... longforma entranĉo ... ordinare destinita por enŝovi ... 2 ... sulkoj, faritaj en la bindado de libro ... fleksi: 1 kurbigi ion sub premo ... 2 falde proksimigi ... samartikajn anatomiajn elementojn ...

Laŭ miaj kompreno kaj imago foldo 1 kaj foldo 2 estas tre malsamaj. Mi konsentas kun vi, ke foldo 1 ankaŭ estiĝas ekzemple per frezado, kaj ne nur per tranĉado. Sed, mi ne komprenas la analogion inter foldo 1 kaj fleksado, premado, faldado kaj similaj teknikoj. La grava punkto ĉe foldo 1, laŭ la difino de la vortaro, estas la forigo de materialo. Tio ĉi estas kontraŭo kun foldo 2. En la diskuto pri faldo/foldo de lado vi emfazas precipe la duan difinon (kaj tiel pravigas la uzon de foldo ĉikuntekste), dum Pierre la unuan (kaj tiel pravigas la ne-uzon de foldo). Laŭvorte vi ambaŭ pravas. Mi konkludas, ke la difinoj en PIV ne sufiĉe taŭgas, kaj ke indus interkonsenti pri nova difino.

Krome mi rimarkas, ke al mi iom strangas via uzo de «fleksi» ĉi tie. Ĉe figuro 1 en KF 25 mi dirus «faldoj», ne «fleksoj». Same pri viaj desegnaĵoj en KF 26. Laŭ miaj kompreno kaj imago de la du difinoj de fleksi en PIV mi ne sekvas vian aserton pri la analogio inter «fleksi ladon» kaj fleksi 2. Peco da lado ja ne havas artikojn. Artiko ja estas grava punkto de fleksi 2. Certe en via imago la analogio estas sufiĉe rekta, sed ne en mia imago. Mi ja dirus «faldi ladon»; kaj «fleksi ladon» rilatas al nur fleksi 1. Anstataŭ «fleksi 2 brakon» mi dirus «faldi brakon». Mi aldonas, (a) ke fleksado povas esti elasta aŭ plasta (en ĉi lasta okazo fleksado de lado povas rezulti al faldaĵo), kaj (b) ke ĉe faldaĵo la alproksimigitaj pecoj ne nepre tuŝas aŭ tre proksimas unu al la alia, la angulo rajtas esti granda. Mi demandas, ĉu ĉe faldaĵo la falda linio estu nepre akra aŭ ankaŭ povas esti rondecata.